



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 187

Novembro 2001

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



## HONORO AL NIA KIM KEEBLE

Per la interreto Inter Ni ricevis kopion de la sekvanta letero de la Prezidanto de la Kanada Esperanto-Asocio al nia samideanino, Kim Keeble. Pro multjara kaj senĉesa laboro por Esperanto, ŝi plene meritas fariĝi Honora Membro de KEA. Gratulon, Kim.

**Kara Kim:**

Estas por mi granda plezuro kaj honoro informi, ke la estraro de Kanada Esperanto-Asocio lastatempe voĉdonis por deklari vin esti Honora Membro de nia Asocio – laŭ la vortoj de la propono, pro via:

„eminenta kaj multjara gvidado de la ‚perpoŝta Esperanto-kurso‘ ne nur en la Atlantikaj provincoj sed ankaŭ en tuta Kanado, pro instruado de Esperanto al infanoj en lernejoj de Nova Skotio kaj pro daŭra kaj lerta informado pri Esperanto en la regiono de Halifakso kaj Upper Rawdon, Nova Skotio”.

Danke al via fidela penado tra la jaroj, eĉ se oni ankoraŭ ne parolas nian lingvon en ĉiu familio de la regiono, almenaŭ jam sufiĉe granda nombro da lernantoj kaj instruistoj ja scias, ke Esperanto ekzistas. Mi forte esperas, ke via energio ne baldaŭ elĉerpiĝos kaj ke vi ankoraŭ longe partoprenos nian batalon vidigi la lumon (se ne nian *Lumon!*) tra nia vastega lando.

Dezirante al vi ĉion bonan, sed antaŭ ĉio, sanon kaj feliĉon, elkore salutas via

**Brian D. Kaneen**  
Prezidanto, Kanada Esperanto-Asocio

## DAŬRIGO DE LA DISKUTO

En la aprila numero de INTER NI aperis "Nefermita Letero al Samideano André Albault" fare de Steĉjo Norvell, pri lia Nova Help-Alfabeto (NHA). D-ro Norvell kontraŭis tiun novan ortografion por Esperanto. Junion aperis "Nefermita Respondo al Samideano Stevens Norvell pri la NHA". D-ro Albault substrekis, ke li konsilas uzi sian NHA-n en la reto, kaj li ne deziras ŝanĝi la presitan aspekton de la lingvo. Komprenoble temas pri solvo per teknologio kiu plejparte favoras anglalingvan ortografion sed, kiel komentis Norvell, oni jam povas solvi tiajn problemojn sen la neceso krei novan ortografion. Nun, D-ro Albault deziras daŭrigi la diskuton, kaj en INTER NI kaj en sia revuo TREFO-6.

— la redaktoro

Ni daŭrigu la diskuton, se vi permesas!

La ĉefa demando estas pri la celo de la esperantistoj. Ĉu ili deziras egoisme uzi Esperanton inter si? Ĉu male ili deziras etendi la konon de Esperanto al la plej granda nombro da homoj?

Se la lingvo estu nur sekreta lingvo de eta kolektivo, la rimedo, kiun ni uzos por transformi nian skribon sur „Internet” aŭ en similaj okazoj, en kiuj la FA (Fundamenta Alfabeto) ne estas uzebla, neniel gravas.

Ni eĉ povos simple forigi ĉian signon kaj skribi ekzemple: ‚carma junulino sajnis goja sur sia ŝipo’. Ĉiu sperta esperantisto komprenos ‚ĉarma junulino ŝajnas ĝoja sur sia ŝipo’. Ne povas esti alia interpreto. . . (krom se oni parolas pri "ŝia ŝipo", t.e. la ŝipo de alia ino – la redaktoro).

Se nia celo pli altas, la afero estos iom alia.

Sed Amiko Norvell trankviliĝu; per makrooj eblas transformi tekston en FA al teksto en NHA kaj denove transformi tiun por reveni al la FA. La transformoj estas tute kaj plene ĝustaj; la komenca kaj la fina tekstoj estos 100 %-e identaj. Eĉ kun ne ŝanĝotaj propraj nomoj kiaj Churchill, Shakespeare ...

Plena klarigo troviĝas en TREFO-3, sur p.8 en mia artikolo „KAT-tualetto”. KAT konsistas el la inicialoj de Komputore Asistata Transalfabetigo kaj (vortludas) kun „kato”. Por fini, mi donos al vi tekston de Zamenhof, kiu donas ŝlosilon por la antaŭreta epoko, sed per makrooj eblas pli facile realigi liajn rekomendojn:

**Eksplicita klarigo de Zamenhof, 1907:**

Skribu . . . „per la litero h anstataŭ la signeto ^, kaj anstataŭ ŭ estu uzata simpla u, kiu post vokalo ĉiam devas esti legata kiel ŭ. En la tre maloftaj okazoj, kiam h post la literoj c, g, h, j, s, aŭ u post vokalo, devas esti elparolataj memstare, ili devas havi antaŭ si apostrofon aŭ streketon (-).” – Tria Cirkulera Letero al la Grupoj Esperantistaj, 1907. En Waringhien, Leteroj de Zamenhof, 1948, p.121. Ankaŭ sur p.2029 de la Ludovikita eldon-serio „PVZ”: Iom reviziita plena verkaro de L.L. Zamenhof, Tria volumo, 1991.

— André Albault

**REDAKTORA KOMENTARIO:**

En sia dankletero al D-ro Albault, D-ro Norvell restis tre duba pri lia proponita helpalfabeto. „Tre ofte mi vidas erarojn en presita materialo nur ĉar iu imagis, ke eblas uzi makroon por transformi tekston de h-kodo al normala Esperanto. ... Mi daŭre dubas, ke via makroo povas solvi tiun problemon. Se ĝi povas, kial la oficistoj ĉe UEA kaj *Eventoj*<sup>1</sup> ne uzas ĝin?”

D-ro Albault parolas pri la celo de esperantistoj kaj sugestas, ke la rifuzo uzi rimedon kiel la NHA en la interreto estas egoisma kaj maletendema. Mi dubas, ĉu li vere deziras tiel klare kaj akre akuzi tion de D-ro Norvell. Ni estas samideanoj, kaj ni traktas teknikajn problemetojn diversmaniere. Sed ĝis nun li ne sufiĉe klare respondas al la demandoj de Steĉjo Norvell pri la detaloj de siaj makrooj kaj, bedaŭre, ĝis nun ni ne povis inspekti lian „KAT-tualetan”.

Dum la pasinta duonjaro ni diskutis inter ni metodojn por ret-letere sendi kaj ricevi tekstojn, kiujn oni povas legi en la normala Esperanto-ortografio. Pro la fakto ke la teknologio tiom rapide disvolviĝas, mi povas nur supozi ke postnelonge ni ne devos trakti tiajn problemojn. Kiel indikas Steĉjo, ni jam havas la teknologion.

— la redaktoro

1. Trovitaj en *Eventoj*: „Planspraĉen”, „Ĉristian”.

**PRI LA LETERO DE PRAGO**

Jen la reago ĝis nun al oktobra kontribuaĵo. - la redaktoro

la 5an de novembro, 2001

Mi devas interkonsenti, Bob,

Ke ‚procezo’ kaj ‚proseso’ havas apartajn signifojn kaj estas pli bone uzi ambaŭ vortojn laŭ iliaj apartaj signifoj ol uzi ‚proseso’-n por ambaŭ signifoj.

Kore,

Ed Harler  
Levittown, Usono